Joseph Freiherr von Eichendorff,

Luna nokto

tradukita de Manfredo Ratislavo

La Tero, de l' Ĉielo
Kisita sajnis Ŝi, 1)
Ke en florbril' Ŝi devus
Sonĝadi nur pri Li.[2]

La vent' tra l' kampoj blovis,
Ondetis la spikar',
Susuris la arbaroj
Kaj brilis la stelar'.

Animo mia alten
Sin svingis de la Ter'
Kaj flugis kvazaŭ hejmen
Trankvile tra l' aer'.

Traduko de la Germana poemo "Mondnacht" de Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-165-327 (2004-02-06 19:30:51)

[2] La vortoj „Ŝi“ kaj „Li“ estas tie ĉi skribitaj majuskle por esprimi, ke la la Tero kaj la Ĉielo estas kvazaŭ personigitaj de la poeto.